


174







Tutmonda Biblioteko je la memoro  
de L. Tolstoj.

---

---

№ 9.

# KAŬKAZA MILITKAPTITO.

RAKONTO DE

L. Tolstoj.

*Tradukis el rusa lingvo*

*N. Kabanov.*



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1063.

Moskvo, 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

Esper. 120 I



Типо-лит. о-гр. Т-ва И. Н. Кушнеревъ и К<sup>о</sup>. Пименовская ул., с. д.  
МОСКВА—1912.

## KAŬKAZA MILITKAPTITO.

### I.

Unu sinjoro servis en Kaŭkazo kiel oficiro. Lia nomo estis Ĵilin.

Unu fojon li ricevis leteron el hejmo. Maljunulino, lia patrino, skribas al li: „mi fariĝis jam maljuna kaj mi deziras ekvidi mian amatan filon antaŭ morto. Alveturu por adiaŭi kun mi, enterigu kaj poste, kun Dio, ekveturu por denove servi. Kaj mi trovis fianĉinon por vi: saĝa, bela, havas bienon. Se vi ekamos ŝin, tiam eble vi edziĝos kaj tute restos hejme“.

Ĵilin enpensiĝis: „efektive, la maljunulino fariĝis jam tre malsanema; eble mi ne ekvidos ŝin. Necesas ekveturi; kaj se la fianĉino estas bona, eble estas edziĝi“.

Li ekiris al kolonelo, ricevis forpermeson, adiaŭis kun kamaradoj, donacis al siaj soldatoj kvar sitelojn da brando por adiaŭo kaj pretiĝis por ekveturi.

En Kaŭkazo tiam estis milito. Estis tre danĝere veturadi sur vojoj: apenaŭ ia ruso deiris aŭ deveturis de fortikaĵo,—tataroj aŭ mortigas aŭ forkondukas lin montojn. Kaj oni aranĝis tiel, ke du fojojn ĉiusemajne akom-

panantaj soldatoj iris el fortikaĵo en fortikaĵon, kaj meze de soldatoj veturis vojaĝantoj.

La afero estis somere. Frumatene veturiloj kunveturis apud fortikaĵo, akompanantaj soldatoj eliris, kaj oni ekveturis. Ĵilin rajdis, veturilo kun liaj havaĵoj veturis en veturilaro.

Oni estis veturontaj dudek kvin verstojn. La veturilaro veturis malrapide; jen la soldatoj haltis, jen rado defalis de akso, jen ĉevalo haltis, kaj ĉiuj staras, atendas.

Jam pasis tagmezo, kaj la veturilaro traveturis nun duonon da vojo. Polvo, varmego; la suno bruligas; nenio estas, kie rifuĝi. Nuda stepo; nek arbo, nek arbeto estas sur la vojo.

Ĵilin ekveturis antaŭen, haltis kaj atendas, kiam la veturilaro ĝisveturos. Li aŭdas, ke oni ekludis per korno malantaŭe,—denove oni staras. Ĵilin pensis: „se mi forveturos sola, sen soldatoj? Mia ĉevalo estas bona, se tataroj atakos min, mi forgalopos. Aŭ ne veturi sola!..“

Li haltis, meditas. Alia oficiro Kostilin, kun pafilo, alveturas al li rajde kaj diras:

— Ekveturu, Ĵilin, ni solaj. Ja estas tute neeble, mi deziras manĝi, kaj estas varmego. Mia ĉemizo estas tute malseka pro ŝvito.—Kaj Kostilin estas homo dika, grasa, tuta ruĝa, kaj ŝvito fluas sur li. Ĵilin pensis iom kaj diras:

— Ĉu via pafilo estas ŝargita?

— Ŝargita!

— Nu, ekveturu. Nur kondiĉo—ne disveturi.

Kaj ili ekveturis antaŭen sur la vojo. Ili veturas sur stepo, interparolas kaj ekrigardadas flankojn. Estas malproksime vidate ĉirkaŭe.

Kiam la stepo finiĝis, la vojo montriĝis en intermonto. Ĵilin diras:

— Necesas surveturi sur monton, ekrigardi; alie, eble, oni elsaltos el-post monto, kaj ni eĉ ne rimarkos.

Kostilin diras:

— Por kio rigardi? ni ekveturu antaŭen. — Ĵilin ne obeis lin.

— Ne, li diras, vi atendu malsupre, kaj mi nur ekrigardos.

Kaj li ekrajdis maldekstren, sur monton.

La ĉevalo sub Ĵilin estis ĉasista (li pagis por ĝi cent rublojn, kiam ĝi estis ĉevalido, kaj li mem edukis ĝin); la ĉevalo suprenigis lin sur monton kiel sur flugiloj. Apenaŭ li surgalopis monten, vidas — antaŭ li mem staras tridek tataroj rajde sur ĉevaloj. Li ekvidis, komencis turni ĉevalon reen; la tataroj ankaŭ ekvidis lin, sin ĵetis al li kaj mem, galopante, elmetas pafilojn el pafilingoj. Ĵilin ekgalopis de la monto je tuta forto kaj krias al Kostilin.

— Elmetu la pafilon! — kaj li mem pensas pri sia ĉevalo: „nu, karulo, veturigu, ne alkroĉiĝu per piedo, se vi faletos,—mi pereos. Se mi atingos pafilon, mi ne donos min al ili“.

Kaj Kostilin, anstataŭ atendi lin, apenaŭ li ekvidis tatarojn, ekveteigis je tuta forto al la fortikaĵo. Li batas ĉevalon per vipo jen sur unu flanko, jen sur alia. En polvo estas nur vidate, ke la ĉevalo turnas voston.



Ĵilin vidas, ke la afero estas malbona. La pafilo forveturis, kun sola sabro estas eble nenion fari. Li ekrajdis reen al la soldatoj—esperis forveturi. Li vidas, ses tataroj galopas de alia flanko. Li komencis deteni la ĉevalon, volis turni ĝin reen, sed la ĉevalo tiel kuregas, ke li ne povas deteni ĝin, rajdas rekte al tataroj kaj li vidas—tataro kun ruĝa barbo sur griza ĉevalo alproksimiĝas al li. Li kriegas, vidigis dentojn kaj pretigis pafilon por pafado.

„Nu, pensas Ĵilin, mi scias vin, diablojn; se vi prenos min viva, vi lokigos min en kavon, batos min per vipo. Mi ne donos min viva al vi“.

Kaj Ĵilin, kvankam li ne estis altkreska, estis brava. Li eltiris la sabron, direktis la ĉevalon rekte sur la ruĝabarban tataron, pensas: „Aŭ mi subpremos lin per mia ĉevalo, aŭ mortigos per sabro“.

Ĵilin preskaŭ atingis lin, sed oni ekpafis de malantaŭe kaj trafis la ĉevalon. La ĉevalo falegis teren,—alpremis piedon de Ĵilin.

Li volis sin levi, sed du malbonodoraj tataroj jam sidas sur li, ligas liajn manojn. Li forpuŝigis, forĵetis de si la tatarojn, sed ankoraŭ tri tataroj malsupreniĝis de ĉevaloj, komencis bati lin je kapo per pafilŝtipoj. Malheliĝis al li en okuloj kaj li eksanceliĝis. La tataroj ekkaptis lin, prenis de seloj rezervajn ĉevalajn ventrozonojn, ligis al li la manojn post la dorso kaj ektiris lin al selo. Ili forbatis de li ĉapon, demetis botojn, traserĉis ĉion, elmetis monon, horloĝon, disŝiris tutan vestaĵon. Ĵilin ekrigardis sian ĉevalon. Kiel ĝi, malfeliĉa,

falis flanken, tiel ĝi kuŝas, nur batiĝas per piedoj — ne povas per piedoj atingi teron; truo estas en ĝia kapo, kaj nigra sango fluas el la truo, malsekigis polvon ĉirkaŭe.

Unu tataro aliris al la ĉevalo, komencis demeti la selon. Ĝi ĉiam batiĝas,—li elmetis ponardon, tratranĉis al ĝi la gorgon. Sango ekflugis el la gorgo; la ĉevalo ekstremegis kaj mortis.

La tataroj demetis selon, jungilaron. La tataro kun ruĝa barbo sidiĝis sur sian ĉevalon, kaj aliaj sidigis Ĵilin'on al li sur selon; kaj por ke li ne falu, ili alligis lin per rimeno al la tataro kaj ekiris montojn.

Ĵilin sidas post la tataro, ŝanceliĝas, batiĝas per vizaĝo je malbonodora tatara dorso. Li nur vidas antaŭ si grandan tataran dorson kaj muskolecan kolon, kaj razita tatara nuko bluas el-sub ĉapo. La kapo ĉe Ĵilin estas disbatita, sango malfluidiĝis super okuloj. Kaj li ne povas sin ordigi sur ĉevalo, nek deviŝi sangon. Liaj manoj estas tiel kunligitaj, ke doloras la klavikloj.

Ili rajdis longe de monto sur monton, travadis riveron, elrajdis sur vojon kaj ekrajdis laŭ intermonto.

Ĵilin volis rimarki vojon, kien oni veturigas lin,—sed la okuloj estas ŝmiritaj per sango, kaj li ne povas sin turni.

Komencis vesperiĝi. Oni transveturis ankoraŭ unu riveron kaj komencis supreniĝi sur ŝtonan monton; eko-doris per fumo, hundoj ekbojis.

Oni alveturis aulon (tatara vilaĝo). La tataroj malsupreniĝis de la ĉevaloj, tataraj infanoj kunvenis, ĉirkaŭis Ĵilin'on, krias, ĝojas, komencis ĵeti je li per ŝtonoj.

Tataro forpelis infanojn, malsuprenigis Ĵilin'on de la ĉevalo kaj vokis laboriston. Venis Nogaja tataro, kun larĝaj vangostoj, en sola ĉemizo. La ĉemizo estas dissi-rita, tuta brusto estas nuda. Tataro ordonis ion al li. La laboristo alportis piedŝtipon: du kverkaj ŝtipoj estas kunigitaj per feraj ringoj, kaj sur unu ringo estas seruro.

Oni malligis la manojn al Ĵilin, surmetis ŝtipon sur unu piedon kaj ekkondukis lin stalon; oni enpuŝis lin tien kaj fermis pordon per seruro. Ĵilin falis sur sterkaĵon. Li kuŝis iom, palpis en mallumo, kie estas pli mole, kaj kuŝiĝis.

## II.

Ĵilin ne dormis preskaŭ tutan tiun ĉi nokton. Noktoj estis mallongaj. Li vidas tra fendo—komencis mateniĝi. Ĵilin sin levis, plilarĝigis la fendon kaj komencis rigardi.

Vojo estas vidata al li tra la fendo; ĝi iras desurmon-  
te, dekstre estas tatara saklo (domo), apud ĝi estas du arboj. Nigra hundo kuŝas sur vojo, kaprino kaj kapri-  
doj iradas, movetas vostetojn. Li vidas—iras surmonten  
juneta tatarino, en florkolora ĉemizo, en pantolonoj kaj  
botoj, la kapo estas kovrita per kaftano, kaj granda lada  
kruĉo kun akvo estas sur la kapo. Ŝi iras, tremetas per  
dorso, kurbiĝas kaj kondukas je la mano tataridon kun  
razita kapo, en sola ĉemizo. La tatarino eniris saklon;  
eliris hieraŭa tataro kun ruĝa barbo, en silka beŝmeto  
(tatara vesto), en botoj sur nudaj piedoj; sur rimena  
zono estas arĝenta ponardo. Sur la kapo estas alta ŝafo-

fela nigra ĉapo, surŝovita sur la nukon. Li eliris, staris ion, ordonis ion al la laboristo kaj ekiris ien.

Poste du infanoj sur ĉevaloj traveturis al trinkejo. Elkuris ankoraŭ knaboj kun razitaj kapoj, en solaj ĉemizoj, sen pantolonoj, kuniĝis amase, aliris al la stalo, prenis branĉeton kaj enŝovas tra la fendo. Ĵilin ekkriis „hu“ al ili: infanoj ekkriegis, ekkuregis for.

Kaj Ĵilin deziras trinki; sekigis en la gorgo; li atendas, kiam oni vizitos lin. Li aŭdas—oni malfermas la stalon. La ruĝohara tataro venis, kun li—alia, malpli altkreska, nigrohara. La okuloj estas nigraj, vangoj estas ruĝaj, barbo estas malgranda, tondita; la vizaĝo estas gaja, li ĉiam ridas. La nigroharulo estas vestita ankoraŭ pli bone: blua silka beŝmeto, ĉirkaŭbrodita per galono. Sur zono estas granda arĝenta ponardo; ŝuetoj estas ruĝaj, marokenaj, ankaŭ arĝente broditaj. Sur la maldikaj ŝuetoj estas aliaj dikaj ŝuoj. Ĉapo estas alta, el blanka ŝafofelo.

La ruĝahara tataro eniris, elparolis ion, kvazaŭ insultas, kaj stariĝis; li apogis sin je pordo, movetas la ponardon kaj kiel lupoj ekrigardadas Ĵilin'on. Kaj la nigroharulo, — vigla, lerta, kvazaŭ tuta kun risortoj — aliris rekte al Ĵilin, ekkaŭris, ridetas, frapetis lin per la mano je ŝultro, komencis paroli ion en sia lingvo, faras signojn per okuloj, klaketas per la lango kaj ĉiam alparolas: „bone ruso! bone ruso!“

Ĵilin komprenis nenion kaj diras:

— Donu akvon trinki!

La nigroharulo ridas. „Bone ruso“, — li ĉiam parolas en sia lingvo.

Ĵilin montris per lipoj kaj manoj, ke oni donu al li trinki.

La nigroharulo komprenis, ekridis, elrigardis el la pordo, vokis iun: „Dina!“

Alkuris knabino, — maldika, malgrasa, dektrijara laŭ eksteraĵo, simila al la nigroharulo per la vizaĝo. Estas vidate, ke ŝi estas lia filino. Same estas nigraj okuloj, kaj la vizaĝo estas bela. Ŝi estas vestita per longa blua ĉemizo, kun larĝaj manikoj kaj sen zono. Sur baskoj, sur brusto, sur manikoj estas ruĝe brodite; sur la piedoj estas pantolonoj kaj ŝuetoj, kaj sur ŝuetoj estas aliaj ŝuoj kun altaj kalkanumoj; sur la kolo estas ĉirkaŭkoloĵo el rusaj duonrublaj moneroj. La kapo estas nekovrita, harligo estas nigra kaj rubando estas en ĝi; ŝildetoj kaj arĝenta rublo estas alpendigitaj al la rubando.

La patro ordonis ion al ŝi. Ŝi forkuris kaj denove venis, alportis ladan kruĉeton. Ŝi donis akvon al Ĵilin, mem ekkaŭris, tute kurbiĝis tiel, ke ŝultroj iĝis pli mal-supre, ol genuoj. Ŝi sidas, malfermis okulojn, rigardas Ĵilin'on, kiel li trinkas, — kiel ian beston.

Ĵilin redonis al ŝi la kruĉeton. Kaj ŝi forsaltis, kiel sovaĝa kaprino. Eĉ la patro ekridis. Li sendis ŝin ankaŭ ien. Ŝi prenis la kruĉon, ekkuris, alportis panon sur ronda tabuleto kaj sidiĝis denove, kurbiĝis, ne de-lurnas la okulojn — rigardas.

La tataroj foriris, denove seruris la pordon.

Post iom da tempo, Nogaja tataro venas al Ĵilin kaj diras:

— Haj—da, mastro, haj—da!

Li ankaŭ ne scias ruse. Ĵilin nur komprenis, ke oni ordonas iri ien.

Ĵilin ekiris kun la pieda ŝtupo, lamas, ne eble estas paŝadi,—ŝtupo tiras piedon flanken. Ĵilin eliris post Nogaja tataro. Li vidas—tatara vilaĝo, dek domoj kaj ilia preĝejo kun turo. Apud unu domo staras tri ĉevaloj kun seloj. Knaboj tenas ĉevalojn je bridoj. Tataro eliris el tiu ĉi domo, eksignis per mano, ke Ĵilin iru al li. Li mem ridas, ĉiam parolas en sia lingvo, kaj foriris en la domon. Ĵilin venis domon. Ĉambro estas bona, muroj estas glate ŝmiritaj per argilo. Apud antaŭa muro diverskoloraj lanugaj kusenoj estas metitaj, multekostaj tapiŝoj estas pendigitaj sur flankaj muroj; sur tapiŝoj—pafiloj, pistoloj, sabroj—ĉiuj arĝentaj. Apud unu muro estas malgranda forno. Planko estas tera, pura kvazaŭ draŝejo, kaj tuta antaŭa angulo estas sternita per feltoj; sur feltoj estas tapiŝoj, kaj sur tapiŝoj estas lanugaj kusenoj. Kaj sur tapiŝoj sidas tataroj en ŝuetoj: nigrohara, ruĝohara kaj tri gastoj. Lanugaj kusenoj estas submetitaj ĉe ĉiuj post dorso, kaj miliaj flanoj estas antaŭ ili sur ronda tabulo, bovina butero estas fandita en tasego, kaj buzo (tatara biero) estas en kruĉeto. Oni manĝas per manoj, kaj ĉiuj manoj estas en butero. La nigrohara tataro sin levis, ordonis sidigi Ĵilin'on flanke, ne sur tapiŝon, sed sur nekovritan plankon, mem sidiĝis denove sur tapiŝon, regalias la gastojn per flanoj kaj per buzo. Laboristo sidigis Ĵilin'on, mem demetis suprajn ŝuojn, metis ilin apud pordo, kie aliaj ŝuoj ankaŭ staris, kaj sidiĝis sur felton pli proksime al la mastroj: li rigardas,

kiel ili manĝas, visas de siaj lipoj salivon. Tataroj manĝis flanojn, tatarino venis en tia sama ĉemizo, kiel ĉe knabino, kaj en pantolonoj; la kapo estas kovrita per tuko.

Ŝi forportis buteron, flanojn, donis lavujon kaj kruĉon. Tataroj komencis lavi manojn, poste ili kunmetis la manojn, sidiĝis genuflekse, ekblovis ĉiujn flankojn kaj elparolis preĝojn. Ili parolis en sia lingvo. Poste unu el tataroj-gastoj sin turnis al Ĵilin kaj komencis paroli ruse.

— Kazi-Muhamed militkaptis vin, li diras kaj montras sur la ruĝaharan tataron,—kaj li fordonis vin al Abdŭl-Muràt, — kaj li montras sur la nigroharulon. — Abdŭl-Muràt estas nun via mastro.—Ĵilin silentas.

Abdŭl-Muràt ekparolis kaj ĉiam montras sur Ĵilin, kaj ridas, kaj alparolas: „soldato ruso, bone ruso“.

La tradukanto diras:

— Li ordonas al vi skribi hejmen leteron, por ke oni alsendu elĉeton por vi. Kiam oni alsendos monon, li forliberigos vin“.

Ĵilin pensis iom kaj diras:

— Kiom li volas preni por mi?

La tataroj parolis iom, kaj la tradukanto diras:

— Tri mil rublojn.

— Ne, diras Ĵilin, mi ne povas pagi tiom.

Abdŭl salte leviĝis, komencis svingi manojn, diras ion al Ĵilin—li ĉiam opinias, ke li komprenos. La tradukanto tradukis, diras:

— Kiom vi donas?

Ĵilin pensis iom kaj diras:

— Kvincent rublojn.

La tataroj tiam ekparolis rapide kaj kune. Abdül komencis insulti la ruĝaharulon, ekparolis tiel, ke salivo ŝprucas el la buŝo. Kaj la ruĝaharulo nur duonfermas okulojn kaj kraketas per la lango.

Ili silentiĝis; la tradukanto diras:

— Kvincentruba elaĉeto estas nesufiĉa por la mastro. Li mem pagis por vi ducent rublojn. Kazi-Muhamed estis lia ŝuldanto. Li prenis vin por ŝuldo. Tri mil rublojn; por pli malgranda sumo estas neeble forliberigi vin. Se vi ne skribos, oni lokigos vin en kavon, oni punos vin per vipo.

„He“, pensas Ĵilin, ju pli malkuraĝa mi estos kun ili, des pli malbone estos“. Ĵilin salte leviĝis kaj diras:

— Diru vi al li, hundo, ke se li volas timigi min, mi donos nenion kaj ne skribos. Mi ne timis vin, hundojn, kaj ne timos.

La tradukanto tradukis, ĉiuj denove ekparolis kune.

Longe ili parolis, la nigraharulo salte leviĝis, aliris al Ĵilin.

— Ruso, li diras, ĝigito, ĝigito ruso!

Ĝigito en ilia lingvo signifas „bravulo“. Kal li mem ridas; li diris ion al la tradukanto, kaj la tradukanto diras:

— Donu mil rublojn.

Ĵilin persistas:

— Mi ne donos pli ol kvincent rublojn. Se vi mortigos min, vi ricevos nenion.

La tataroj parolis iom, sendis ien la laboriston kaj



mem ekrigardas jen Ĵilin'on jen la pordon. La laboristo revenis kaj post li iras iu homo, dika, nudpieda, kun disŝirita vestaĵo, sur piedo estas ankaŭ ŝtupo.

Ĵilin ekmiregis — li ekkonis Kostilin'on. Oni ekkaptis ankaŭ lin. Oni sidigis lin kune; ili komencis rakonti unu al alia, kaj la tataroj silentas, rigardas. Ĵilin rakontis, kio okazis al li; Kostilin rakontis, ke la ĉevalo ĉesis kuri kaj pafilo ne ekpafis, kaj tiu ĉi sama Abdŭl atingis lin kaj militkaptis.

Abdŭl salte leviĝis, montras sur Kostilin'on, parolas ion. La tradukanto tradukis, ke ili ambaŭ nun apartenas al la sama mastro, kaj kiu el ili donos monon pli antaŭe, tiun li forliberigos pli antaŭe.

— Jen, li diras al Ĵilin, vi ĉiam koleras, kaj via kamarado estas kvieta; li skribis hejmen leteron, oni alsendos kvin mil rublojn. Jen oni nutros lin bone kaj ne ofendos.

Ĵilin diras:

— La kamarado agas, kiel li volas; eble, li estas riĉa, kaj mi ne estas riĉa. Kiel mi diris, tiel estos. Se vi volas, mortigu, — pro tio ne estos profito al vi, kaj mi skribos nur pri kvincent rubloj.

Oni silentis iom. Subite Abdŭl sin levis, prenis keston, elmetis plumon, pecon da papero kaj inkon, donis al Ĵilin, frapetis lin je ŝultro, montras: „skribu“. Li konsentis je kvincent rubloj.

— Atendu ankoraŭ, Ĵilin diras al la tradukanto, diru al li, ke li nutru nin bone, donu veston, botojn, kiel decas, ke li lokigu nin kune, estos pli gaje por ni, kaj

ke li demetu la piedan ŝtipon. Li mem rigardas la mastron kaj ridas. La mastro ankaŭ ridas. Li auskultis kaj diras:

— Mi donos plej bonan veston: ĉerkesan veston kaj botojn. Mi nutros ilin kiel princojn. Kaj se ili deziras loĝi kune — loĝu kune en la stalo. Sed ne eble estas demeti la piedajn ŝtipojn — ili forkuros. Nur por nokto oni demetos ŝtipojn. Li aliris, frapetas je ŝultro:

— Vi bona, mi bona!

Ĵilin skribis leteron, sed li skribis malĝustan adreson, por ke la letero ne ĝisiru hejmen. Kaj mem li pensas: „mi forkuros“.

Oni forkondukis Ĵilin'on kaj Kostilin'on en la stalon, alportis al ili tien maizan pajlon, akvon en kruĉo, panon, du malnovajn ĉerkesvestojn kaj eluzitajn soldatajn botojn. Eble, ili demetis ilin de mortigitaj soldatoj. Por nokto oni demetis de ili ŝtipojn kaj seruris la stalon.

### III.

Ĵilin vivis tiel kun la kamarado tutan monaton. La mastro ĉiam ridas, — Vi, Ivano, bona, — mi, Abdul, bona. — Kaj li nutris malbone, donis nur panon de milia faruno, bakitan je pastelo, kaj iafoje nebakitan paston.

Kostilin skribis hejmen ankoraŭ unu fojon, ĉiam atendis alsendon de mono kaj enuis. Tutajn tagojn li sidas en la stalo kaj kalkulas tagojn, kiam la letero venos, aŭ dormas. Kaj Ĵilin sciis, ke lia letero ne estos ricevita, sed li ne skribis alian.

„Kie“, li pensas, „la patrino prenos tiom da mono

por pagi por mi! Ja ŝi vivis pleje nur per tio, kion mi sendadis al ŝi. Se ŝi kolektos kvincent rublojn, ŝi tute ruiniĝos. Dio helpos,—mi mem liberiĝos“.

Kaj mem li ĉiam rigardas, esploras, kiel forkuri. Li iradas en aulo, fajfetas; iafoje li sidas, manlaboras ion, aŭ skulptas pupojn el argilo, aŭ plektas el vergoj korbojn. Ĵilin estis majstro por ĉiuj manlaboroj.

Unufojon li skulptis pupon kun nazo, kun brakoj, kun piedoj kaj en tatara ĉemizo; kaj li starigis pupon sur tegmenton.

Tatarinoj ekiris por alporti akvon. La mastra filino, Dina, ekvidis la pupon, vokis tatarinojn. Ili metis kruĉojn teren, rigardas, ridas. Ĵilin prenis la pupon, donas al ili. Ili ridas, sed ne kuraĝas preni. Li restigis la pupon, foriris stalon kaj rigardas, kio okazos.

Dina alkuris, ekrigardis reen, ekkaptis la pupon kaj forkuris.

Matene li rigardas, Dina eliris sur sojlon kun la pupo. Ŝi jam ornamis la pupon per ruĝaj tukpecetoj kaj lulas kiel infanon, mem alparolas en sia lingvo. Maljunulo eliris, ekinsultis ŝin, kaptis la pupon, disbatis ĝin, sendis Dina'n ien por laboro.

Ĵilin faris alian pupon, ankoraŭ pli bonan,—fordonis al Dina. Unu fojon Dina alportis kruĉeton, metis, sidiĝis, rigardas lin, mem ridas, montras sur kruĉon.

„Pro kio ŝi ĝojas?“ Ĵilin pensas. Li prenis kruĉon, komencis trinki. Li opiniis, ke ĝi estas akvo, sed tie estas lakto. Li trinkis lakton, — „bone“, li diras. Kiel Dina ekĝojis!

— Bone, Ivano, bone! kaj ŝi salte leviĝis, ekfrapis je manoj, ekkaptis la kruĉon kaj forkuris.

Kaj de tiu tempo ŝi komencis ŝtele alporti al li lakton ĉiutage. Tataroj iafoje faras el kaprina lakto fromaĝojn, pastelojn kaj sekigas ilin sur tegmento; ŝi alportadis al li sekrete tiujn ĉi pastelojn. Unu fojon la mastro mortigis ŝafon, — ŝi alportis al li en la maniko pecon da ŝafajo. Ŝi ĵetas kaj forkuras.

Unu fojon estis forta fulmotondro, kaj pluvegis tutan horon. Ĉiuj riveretoj malheliĝis. Kie vadejo estis, tie rivero atingis du metrojn de profundo, turnas ŝtonojn. Ĉie riveretoj fluas, bruego estas sur montoj. Jen kiam la fulmotondro pasis, ĉie riveretoj kuras en la vilaĝo. Ĵilin elpetis ĉe la mastro tranĉilon, eltranĉis cilindreton, tabuletojn, radon kaj alfaris al la rado pupojn.

Knabinoj alportis al li tukpecetojn, — li vestis la pupojn: unu — viro, alia — virino; kaj li starigis la radon sur rivereton. La rado turniĝas, kaj la pupoj saltas.

Ĉiuj vilaĝanoj kunvenis; knaboj, knabinoj, virinoj; kaj tataroj venis, alparolas:

— Ha, ruso! Ha, Ivano!

Abdŭl havis rusan horloĝon, difektitan. Li vokis Ĵilin, montras, kraketas per la lango. Ĵilin diras:

— Donu, mi riparos.

Li prenis ĝin, riparis. La horloĝo funkcias.

La mastro ĝojiĝis, alportis al li sian malnovan beŝmeton, tuta en ĉifonoj, donacis. Kion fari, — li prenis; ĝi taŭgos sin kovri nokte.

De tiu tempo famo disvastiĝis pri Ĵilin, ke li estas

majstro. Oni komencis alveturi al li el malproksimaj vilaĝoj; iu alportas pafilon aŭ pistolon por ripari, iu—horloĝon. La mastro alveturigis al li ilaron: prenilon, borilon, fajlilon.

Tataro malsaniĝis unufoje; oni aliris al Ĵilin: „iru, kuracu“. Ĵilin tute ne scias, kiel kuraci. Li ekiris, rigardis, pensas: „eble, li mem resaniĝos“. Li revenis stalon, prenis akvon, sablon, kunmiksitis. En ĉeesto de tataroj li murmuris ion super akvo, donis trinki. La tataro resaniĝis por lia feliĉo. Ĵilin komencis iom kompreni ilian lingvon. Iaj tataroj alkutimiĝis al li; kiam ili bezonas lin, ili vokas: Ivano, Ivano! sed iuj ekrigardadas lin, kiel beston.

La ruĝahara tataro ne amis Ĵilin'on. Kiam li ekvidas lin, sulkas frunton kaj deturnas sian vizaĝon aŭ insultas. Unu maljunulo ankoraŭ estis ĉe ili. Li loĝis ne en la aŭlo, sed venadis de malsupro de monto. Ĵilin vidadis lin nur tiam, kiam li venadis moskeon por preĝi al Dio. Li estis malaltkreska, blanka viŝtuko estis ĉirkaŭvolvita ĉirkaŭ lia ĉapo, barbo kaj lipharoj estis tonditaj, estis blankaj kiel lanugo. Kaj vizaĝo estis tute sulkita kaj ruĝa, kiel briko. Nazo estis kurba, kiel ĉe akcipitro, okuloj—grizaj, malbonaj; dentoj malestis,—restis nur du kojnaj dentoj. Okazadis, li iras en sia turbano, sin apogas je bastono kaj ekrigardadas flankojn kiel lupoj. Kiel li ekvidas Ĵilin'on, li ekronkas kaj deturnas la vizaĝon.

Unu fojon Ĵilin ekiris desurmonte — por rigardi, kie la maljunulo loĝas. Li malsupreniĝis laŭ vojeto, vidas—la ĝardeno, ŝtona baraĵo; el-post baraĵo vidiĝas merizuj-

oj, abrikotujoj, dometo kun plata tegmento. Li aliris pli proksime; li vidas—abelujoj plektitaj el pajlo staras, kaj abeloj flugas, zumas. Kaj la maljunulo staras sur genuoj, laboras ion apud abelujo. Ĵilin sin levis pli alte por rigardi kaj ekbruis per la ŝtupo. La maljunulo ekrigardis kaj ekkriegis; li ekkaptis pistolon kaj ekpafis kontraŭ Ĵilin. Apenaŭ li sukcesis sin kaŝi post ŝtono.

La maljunulo venis al la mastro por plendi. La mastro alvokis Ĵilin'on, mem ridas kaj demandas:

— Por kio vi iris al la maljunulo?

— Mi, li diras, faris nenian malbonon al li. Mi volis rigardi, kiel li vivas.

Kaj la maljunulo koleras, parolas ion, vidigas siajn kojnajn dentojn, svingas per manoj je Ĵilin.

Ĵilin ne komprenis ĉion; li nur komprenis, ke la maljunulo ordonas al la mastro mortigi la rusojn, sed ne teni ilin en la aulo. La maljunulo foriris.

Ĵilin komencis demandi la mastron: kiu estas tiu ĉi maljunulo. La mastro diras:

— Ĝi estas granda homo! Li estis plej bona ĝigito, li mortigis multajn rusojn, estis riĉa. Li havis tri edzinojn kaj ok filojn. Ĉiuj vivis en unu aulo. Rusoj venis, ruinigis vilaĝon kaj mortigis sep filojn. Sola filo restis kaj transdonis sin al rusoj. La maljunulo ekiris kaj mem transdonis sin al rusoj. Li vivis ĉe ili tri monatojn, trovis tie sian filon, mem mortigis lin kaj forkuris. De tiu tempo li ĉesis militi, ekiris Mekon por preĝi al Dio. Pro tio li havas turbanon. Kiu vizitis Mekon, tiu nomiĝas Haĝi kaj surmetas turbanon. Li ne amas vin, rusojn.

Li ordonas mortigi vin; sed mi ne povas mortigi vin,— mi pagis monon por vi; kaj mi ekamis vin, Ivano: mi ne nur ne volas mortigi, sed eĉ ne liberigus vin,—se mi ne promesus.—Li ridas kaj mem alparolas ruse:—vi, Ivano, bona—mi, Abdùl, bona!

#### IV.

Ĵilin travivis tiel monaton. Tagojn li iradas en aulo aŭ manlaboras, kaj kiam noktĝis, silentĝis en aulo, li fosas en la stalo. Estis malfacile fosi pro ŝtonoj, sed li fajlis ŝtonojn per fajlilo kaj trafosis sub muro tian truon, ke estis eble trarampi. „Nur“, li pensas, „se mi sciĝus lokon plibone, kien iri. Sed neniu el tataroj diras“.

Jen li elektis tempon, kiam la mastro forveturis; post tagmanĝo li ekiris post aulon sur monton,—volis de tie rigardi lokon. Sed kiam la mastro estis forveturanta, li ordonis al sia knabo, ke li gardu Ĵilin'on, observu lin. La knabo kuras post Ĵilin, krias:

— Ne iru! La patro malpermesis. Mi tuj vokos homojn.

Ĵilin komencis admoni lin.

— Mi, li diras, ne ekiros malproksimen, mi nur supreniĝos sur tiun monton: al mi necesas trovi herbon, por kuraci vian popolon. Ekiru kun mi; mi ne povas forkuri kun ŝtupo. Mi faros morgaŭ al vi pafarkon kaj sagojn.

Li konvinkis la knabon kaj ili ekiris. Se rigardi monton, ŝajnas—ne malproksime, sed kun la ŝtupo sur la piedo

estis malfacile; li iris, iris, kun granda malfacileco supreniĝis. Ĵilin sidiĝis, komencis ĉirkaŭrigardi lokon. Sude, post staloj, estas valetto, ĉevalaro sin paŝtas, kaj alia aulo vidiĝas malsupre. De aulo komenciĝas alia monto, ankoraŭ pli kruta, kaj post tiu monto estas ankoraŭ monto. Inter montoj bluas arbaro, kaj tie estas ankoraŭ montoj, ĉiam pli altaj. Kaj plej alte staras blankaj, kiel sukero, montoj, kovritaj per neĝo. Kaj unu neĝa monto staras, multe pli alta, ol aliaj, kvazaŭ kovrita per blanka ĉapo. Oriente kaj okcidente — ĉie tiaj samaj montoj; ie auloj fumas en intermontoj. „Nu“, li pensas: „ĝi estas ĉiam ilia lando“. Li komencis rigardi rusan flankon:—malsupre estas rivereto, aulo, ĉirkaŭe ĝardenoj. Sur la rivereto estas vidataj virinoj, kvazaŭ malgrandaj pupoj; ili sidas, lavas tolaĵon. Post aulo, pli malsupre, estas monto; post ĝi estas ankoraŭ du montoj, kovritaj per arbaro; kaj inter montoj vidiĝas ebenaĵo, kaj sur la ebenaĵo, malproksime, malproksime, kvazaŭ fumo sterniĝas. Ĵilin komencis rememori, kie la suno leviĝadis, kie subiradis, kiam li loĝis hejme, en fortikaĵo. Tien, inter du tiujn ĉi montojn, necesas kuri.

La suno komencis subiri. Neĝaj montoj fariĝas helruĝaj; mallumiĝis en mallumaj montoj: nebulo supreniĝis el valo, kaj la sama valo, kie nia fortikaĵo devas esti, fajre koloriĝis pro sunsubiro. Ĵilin komencis enrigardadi, — io rekte supreniĝas en la valo, kvazaŭ fumo el kamentuboj. Kaj opiniĝas al li, ke ĝi estas rusa fortikaĵo.



Jam fariĝis malfrue. Estas aŭdate, — tataro pastro jam kriis. Oni kondukas brutaron, — bovinoj, muĝas. La knabo ĉiam vokas: „ekiru“, sed Ĵilin ne volas foriri.

Ili revenis hejmen. „Nu, pensas Ĵilin, mi scias nun lokon; necesas kuri“. Li volis kuri tiun saman nokton. Noktoj estis mallumaj, — estis luna malgrandiĝo. Malfeliĉe tataroj revenis vespere. Okazadis, ili alkondukas kun si brutaron kaj alveturas gajaj. Sed tiun ĉi fojon ili alkondukis nenion, kaj alveturigis sur selo sian mortigitan tataron, fraton de ruĝaharulo. Ili alveturis koleraĵ, ĉiuj kunvenis por enterigi. Ĵilin ankaŭ eliris por rigardi. Oni envolvis malvivulon en tolon, sen ĉerko, elportis sub platanojn post la vilaĝo, kuŝigis sur herbon. Tataro pastro venis, oni sidis kune genuflekse antaŭ malvivulo.

La pastro estas antaŭe, poste — tri maljunuloj en turbanoj, kune, kaj post ili — ankoraŭ tataroj. Ili sidiĝis, klinis la kapojn kaj silentas. Ili silentis longe. La pastro levis la kapon kaj diras:

— Alla! (t. e. Dio!) Li diris tiun ĉi solan vorton kaj ili denove klinis la kapojn kaj longe silentis; ili sidas — ne movetiĝas. La pastro denove levis la kapon:

— Alla! kaj ĉiuj elparolis: „Alla“, — kaj denove silentiĝis. La malvivulo kuŝas sur herbo, ne movetiĝas, ili ankaŭ sidas, kvazaŭ malvivuloj. Neniu movetiĝas. Nur estas aŭdate — la folietoj de la platano turnetiĝas pro venteto. Poste la pastro elparolis preĝon, ĉiuj sin levis, prenis la malvivulon kaj ekportis. Ili alportis al kavo. La kavo estis fosita ne simpla, sed estis subfosita sub tero, kiel keło. Oni prenis la malvivulon sub ŝultroj

kaj sub piedoj, malsuprenigis iom post iom, enŝovis sub teron en sida pozicio, metis liajn manojn sur ventron.

La Nogaja tataro alportis verdan kanon, oni kovris kavon per kano, rapide sursutis teron, ebenigis kaj starigis ŝtonon apud la kapo de la malvivulo. Ili piedfrapis teron, denove sidiĝis kune antaŭ la tombo. Ili silentis longe.

— Alla! Alla! Alla!—Ili ekspiris kaj sin levis.

La ruĝaharulo disdonis monon al la maljunuloj, poste li sin levis, prenis vipon, ekbatis sin je frunto trijoje kaj ekiris hejmen.

Matene Ĵilin vidas — la ruĝaharulo kondukas ĉevalinon post la vilaĝon kaj post li tri tataroj iras. Ili eliris post la vilaĝon, la ruĝaharulo demetis beŝmeton, elturnis manikojn, — la brakoj estas muskolecaj, — li elmetis ponardon, akrigis sur akrigilo. La tataroj levis supren la kapon de la ĉevalino, la ruĝaharulo aliris, tratranĉis la gorgon, faligis la ĉevalinon kaj komencis eltranĉi internaĵojn kaj senhaŭtigi. Virinoj, fraŭlinoj venis, komencis lavi intestojn, internaĵojn. Poste oni dispecigis la ĉevalinon, forportis hejmen. Kaj ĉiuj vilaĝanoj kunvenis al la ruĝaharulo por funebra festeno.

Tri tagojn oni manĝis ĉevalinan viandon, trinkis buzon, funebre festenis.

Ĉiuj tataroj estis hejme. Kvaran tagon Ĵilin vidas, oni pretiĝas por ien ekveturi tagmeze. Oni alkondukis ĉevalojn, kaj dek homoj ekveturis, kaj la ruĝaharulo ekveturis ankaŭ: nur Abdŭl restis hejme. Estis novluno, kaj noktoj estis ankoraŭ mallumaj.

„Nu“, pensas Ĵilin, „hodiaŭ necesas kuri“, kaj li diras al Kostilin. Sed Kostilin malkuraĝiĝis.

— Kiel kuri? Mi ja ne scias vojon.

— Mi scias vojon.

— Sed ni ne ĝisiros dum nokto.

— Se ni ne ĝisiros, ni pasigos nokton en arbaro. Mi jen provizis pastelojn. Por kio vi restos tie ĉi? Bone, se oni alsendos monon, sed povas okazi, ke oni ne kolektos monon. Kaj tataroj estas nun koleraĵoj pro tio, ke rusoj mortigis tataron. Ili pripensas, volas mortigi nin.

Kostilin pensis, pensis.

— Nu, iru.

## V.

Ĵilin enrampis en truon, elfosis pli larĝe, por ke Kostilin povu ankaŭ trarampi; kaj ili sidas, atendas, kiam oni silentiĝos en la aulo.

Apenaŭ popolo silentiĝis en la aulo, Ĵilin ekrampis sub la muro, eliĝis. Li murmuretas al Kostilin: „rampu“. Kostilin ankaŭ ekrampis, sed alkroĉiĝis per la piedo je ŝtono kaj ekbruis. Kaj ĉe la mastro estis gardanto, diverskolora hundo, tre kolereza; ĝi estis nomata Ulaŝin. — Ĵilin jam antaŭe nutradis ĝin. Ulaŝin ekaŭdis, ekbojis kaj ekkuris; post ĝi — aliaj hundoj. Ĵilin iomete ekfajfis, elmetis pecon da pastelo, — Ulaŝin ekkonis, eksvingadis per vosto kaj ĉesis boji.

La mastro ekaŭdis, ekkriis el la saklo: „ha, ha! Ulaŝin!“

Ĵilin karesas Ulaŝin'on post oreloj. La hundo silentas, sin frotas je liaj piedoj, svingas per la vosto.

Ili sidis iom post angulo. Ĉio silentiĝis; nur estas aŭdate—ŝafino tusas en ŝafejo, kaj malsupre akvo brue fluas laŭ ŝtonoj. Estas mallume; steloj alte staras sur ĉielo; super monto nova luno ekruĝiĝis, subiras—korne-toj supren. Nebulo kvazaŭ lakto blankas en valetoj.

Ĵilin sin levis, diras al la kamarado:

— Nu, frato, kuru!

Ili ekiris; apenaŭ ili deiris, aŭdas — la tatara pastro ekkantis sur tegmento: „Alla! Besmilla! Ilrahman!“ Ĝi signifas — popolo ekiru moskeon. Ili denove sidiĝis, ka-siĝinte apud muro. Ili sidis longe, atendis, kiam popolo pasos. Oni denove silentiĝis.

— Nu, Dio helpu! ili faris krucan signon, ekiris. Ili pasis tra korto desurmonte al rivereto, trairis rivereton, ekiris laŭ valetoj. Nebulo estas densa, sed staras mal-supre, super kapoj steloj estas vidataj. Ĵilin rimarkas laŭ steloj, kian flankon iri. En nebulo estas malvarmete, estas facile [iri, nur botoj estas neoportunaj — eluziĝis. Ĵilin demetis siajn botojn, jetis ilin, ekiris nudpieda. Li saltetas de ŝtono al ŝtono kaj ekrigardadas stelojn. Kostilin komencis postresti.

— Iru, li diras, pli malrapide: malbenitaj botoj frot-vundis kaj dolorigas piedojn.

— Vi demetu ilin, estos pli facile.

Kostilin ekiris nudpieda, estas ankoraŭ pli malbone: li tranĉvundis la piedojn je ŝtonoj kaj ĉiam postrestas. Ĵilin diras al li:

— Se vi frotvundos piedojn, ili resaniĝos, sed se oni atingos nin, estos pli malbone, oni mortigos nin.

Kostilin diras nenion, iras, ĝemetas. Ili longe iris laŭ valetoj. Ili aŭdas — hundoj ekbojis dekstre. Ĵilin haltis, ĉirkaŭrigardis, ekrapis surmonten, ekpalpis per manoj.

— He, li diras, ni perdis vojon; ni ekiris tro dekstre. Tie ĉi estas fremda aŭlo, — mi vidis lin de la monto; necesaj iri reen kaj maldekstren, surmonten. Tie ĉi arbaro devas esti:

Kaj Kostilin diras:

— Atendu kvankam nemulte, donu ripozojn iom, — miaj piedoj estas tutaj en sango.

— He, frato, ili resaniĝos; vi saltetu pli facile. Jen kiel.

Kaj Ĵilin ekkuris reen, maldekstren, surmonten, en arbaron. Kostilin ĉiam postrestas kaj ĝemas. Ĵilin murmurettadas al li: ts! kaj mem ĉiam iras.

Ili supreniĝis sur monton. Estas arbaro. Ili eniris en arbaron, tute disŝiris sian vestaĵon. Ili okaze trovis voĵeton en la arbaro. Ili iras.

— Haltu! Io ekfrapis per hufoj sur vojo. Ili haltis, aŭskultas. Io piedefrapis iom, kvazaŭ ĉevalo, kaj haltis. Ili ekiris, — ĝi denove ekfrapis. Ili haltas kaj ĝi ankaŭ haltas. Ĵilin alrapis, rigardas, — io staras: ĉu ĉevalo — ĉu ne, kaj sur ĉevalo estas io, nesimila al homo. Li aŭdas, — ĝi ekronkis. „Kia mirindaĵo!“ Ĵilin iomete ekfajfis, — tuj ĝi ekkuregis de la vojo en arbaron kaj ekkrakis en arbaro, flugas, kvazaŭ ventego rompas branĉojn.

Kostilin falis pro timo. Kaj Ĵilin ridas, diras:

— Ĝi estas cervo. Ĉu vi aŭdas, kiel ĝi rompas branĉojn per kornoj? Ni timas ĝin, kaj ĝi timas nin.

Ili ekiris pluen. Jam nelonge restas ĝis mateno. Kaj

ĉu ili iras ĝuste aŭ malĝuste,—ili ne scias. Opiniigas al Ĵilin, ke oni veturigis lin laŭ sama vojo kaj ke restas ankoraŭ dek verstoj ĝis la fortikaĵo; sed certa signo ne estas, kaj estas punkto, malfacile estas kompreni. Ili eliris arbarherbejon. Kostilin sidiĝis kaj diras:

— Kiel vi volas, mi ne iros plu,—miaj piedoj ne iras. Ĵilin komencis admoni lin.

— Ne, li diras, mi ne ĝisiros, mi ne povas.

Ĵilin ekkoleris, ekkraĉis, ekinsultis lin.

— Nu, tiaokaze mi ekiros sola,—adiaŭ!

Kostilin sin levis, ekiris. Ili pasis kvar verstojn. Nebulo fariĝis ankoraŭ pli densa en arbaro, ili vidas nenion antaŭ si, kaj steloj estas preskaŭ ne vidataj.

Subite ili aŭdas, ĉevalo piedfrapas antaŭe. Audiĝas—ĝi alkroĉiĝadas je ŝtonoj per hufoj. Ĵilin kuŝiĝis sur ventron, komencis aŭskulti tere.

— Jes, vere, rajdanto veturas al ni.

Ili dekuris de la vojo, sidiĝis en arbitaĵon kaj atendas. Ĵilin alrampis al la vojo, rigardas—tataro rajdas, kondukas bovinon kaj ion murmuris sub nazon al si. La tataro trarajdis. Ĵilin revenis al Kostilin.

— Nu, Dio trairigu lin,—levu vin, ekiru.

Kostilin komencis sin levi kaj falis.

— Mi ne povas, je Dio mi ne povas; mi tute ne havas fortojn.

La dika grasa viro ekŝvitis; kaj malvarma nebulo ĉirkaŭprenis lin en la arbaro, kaj la piedoj estas frotvunditaj,—li tute malfortiĝis. Ĵilin komencis levi lin perforte, Kostilin ekkriis:

— Ho, doloras!

Ĵilin eĉ preskaŭ mortis pro timo.

— Por kio vi krias? Ja la tataro estas proksime,— ekaŭdos. Kaj mem li pensas: „Li vere malfortiĝis; kion mi faros al li? Sed forlasi kamaradon tute ne decas“.

— Nu, li diras, levu vin, sidigu vin sur mian dorson,—mi portos vin, se vi ne povas iri.

Li sidigis Kostilin'on sur sin, ĉirkaŭprenis liajn piedojn per la manoj, eliris vojon, ekportis.

— Nur, li diras, ne prenu vi mian gorgon per manoj, pro Dio. Tenu vin je miaj ŝultroj.

Malfacile estas al Ĵilin, — la piedoj estas ankaŭ en sango kaj li lacigis. Li kliniĝas, ordigas lin, ekskuas lin iom supren, ke Kostilin sidu sur li pli alte, kaj denove portas lin sur vojo.

Videble la tataro aŭdis, kiel Kostilin ekkriis. Ĵilin aŭdas—iu rajdas malantaŭe, vokas en sia lingvo. Ĵilin sin ĵetis en arbitaĵojn. La tataro prenis pafilon, ekpafis,—maltrafis, ekkriis kaj ekgalopis reen laŭ vojo.

— Nu, diris Ĵilin, ni pereis, frato! Li, hundo, tuj kolektos tatarojn por atingi nin. Se ni ne trairos tri verstojn, ni pereis. Kaj mem li pensas pri Kostilin: „Kiu diablo igis min preni kun mi tiun ĉi dikulon. Sola mi jam antaŭlonge estus foririnta.“

Kostilin diras:

— Iru sola, por kio vi pereos pro mi.

— Ne, mi ne ekiros sola, ne decas forlasi kamaradon.

Li denove prenis lin sur ŝultroj, ekportis. Li pasis tiel unu verston. Arbaro ĉiam daŭras kaj eliro ne estas

vidata. Kaj nebulo komencis jam malaperi, kvazaŭ nubetoj komencis aperi, steloj jam ne estas vidataj. Ĵilin tute elturmentiĝis.

Apud vojo ili renkontis fonton, ordigitan per ŝtonoj. Ĵilin haltis, malsuprenigis Kostilin'on.

— Ni ripozu, trinku, li diras. Ni manĝu pastelojn. Versajne estas nemalproksime.

Apenaŭ li alkuŝiĝis por trinki, aŭdas,—io piedfrapas malantaŭe. Ili denove sin ĵetis dekstren, en arbitaĵojn kaj kuŝiĝis.

Ili aŭdas tatarajn voĉojn; la tataroj haltis sur tiu sama loko, kie ili flankeniĝis de la vojo. Ili parolis iom, poste ekkriis, kiel oni instigas hundojn. Ili aŭdas,—io krakas en arbitaĵoj, ies fremda hundo kuras rekte al ili. Ĝi haltis, ekbojis.

La tataroj aliris,—ankaŭ fremdaj; ili ekkaptis ilin, ligis, sidigis sur ĉevalojn, ekveturigis.

Ili traveturis tri verstojn—la mastro Abdŭl kun du tataroj renkontas ilin. Ili interparolis ion kun la tataroj, transidigis ilin sur siajn ĉevalojn, ekveturigis reen en aulon.

Abdŭl jam ne ridas kaj parolas nenion kun ili.

Oni alveturigis ilin aulon, sidigis sur la strato. Infanoj kunkuris, batas ilin per ŝtonoj, per vipoj, kriegas.

Tataroj grupe kuniĝis, ankaŭ la maljunulo demalsupre de monto venis. Oni komencis interparoli. Ĵilin aŭdas, ke oni preparolas, kion fari al ili. Unuj diras: „necesas sendi ilin pli malproksime en montojn“, kaj la maljunulo diras: „necesas mortigi ilin“. Abdŭl disputas, diras: „mi donis monon por ili, mi prenos elaceton por ili“. Kaj la



maljunulo diras: „Ili pagos nenion, nur kaŭzos malfeliĉon. Kaj estas peke nutri rusojn. Mortigi — kaj jen estas fino“.

Oni disiris. La mastro aliris al Ĵilin, komencis paroli al li.

— Se, li diras, oni ne sendos elaĉeton por vi, post du semajnoj mi vergos vin ĝis morto. Kaj se vi denove provos kuri, mi mortigos vin kiel hundon. Skribu leteron, bone skribu!

Oni alportis al ili paperon, ili skribis leterojn. Oni surmetis al ili piedajn ŝtipojn, forkondukis post moskeon. Tie estis kavo, profunda je tri metroj, kaj oni malsuprenigis ilin en tiun ĉi kavon.

## VI.

Ilia vivado fariĝis tute malbona. Oni ne demetis ŝtipojn kaj ne eligadis el la kavo. Oni ĵetadis tien al ili nebakitan paston, kiel al hundoj kaj malsuprenigadis akvon en kruĉo. Malbonodoro estas en la kavo, sufokanta varmego, malsekaĵo. Kostilin tute malsaniĝis, ŝveligis, tuta korpo komencis dolori; li ĉiam ĝemas aŭ dormas. Kaj Ĵilin malgajiĝis, vidas—la afero estas malbona. Kaj li ne scias, kiel eliĝi el la kavo.

Li komencis subfosi, sed ne estas loko, kien ĵeti teron; la mastro rimarkis, minacis mortigi.

Unufoje li sidas kaŭre en kavo, pensas pri libera vivado kaj enuas. Subite unu pastelo falis al li rekte sur genuojn, alia pastelo, poste ĉerizoj eksutiĝis. Li ekri-

gardis supren, tie estas Dina. Ŝi rigardis lin iom, ridis kaj forkuris. Ĵilin jen pensas: „ĉu Dina ne povas helpi?“

Li purigis en kavo unu loketon, elfosis argilon, komencis skulpti pupojn. Li skulptis homojn, ĉevalojn, hundojn, pensas: „kiam Dina venos, mi ĵetos al ŝi“.

Nur — alian tagon Dina ne venis. Kaj Ĵilin aŭdas — ĉevaloj ekfrapis per piedoj, iuj traveturis kaj tataroj kunvenis apud la moskeo, disputas, krias, nomas rusojn. Kaj li aŭdas voĉon de la maljunulo. Li bone ne komprenis, sed konjektas, ke rusoj aliris proksime, kaj la tataroj timas, ke ili venos en aulon, kaj ne scias, kion fari al militkaptitoj.

Ili interparolis iom kaj foriris. Subite li aŭdas, — io ekbruetis supre. Li vidas: Dina ekkaŭris, la genuoj estas pli alte ol la kapo, klinis sin super la kavo, ĉirkaŭkolo pendas, ŝanceliĝas super la kavo. La okuletoj brilas kiel steletoj; ŝi elmetis el la maniko du fromaĝajn pastelojn, ĵetis al li.

Ĵilin prenis kaj diras: — „Pro kio vi antaŭlonge ne venis? mi preparis ludilojn al vi. Jen, prenu!“ Li komencis ĵeti al ŝi po unu.

Sed ŝi balancas la kapon, ne rigardas. „Malnecesas“, ŝi diras. Ŝi silentis iom kaj diras: „Ivano! Oni volas vin mortigi“. Kaj ŝi montras sur sian kolon per la mano.

— Kiu volas mortigi?

— La patro volas, la maljunuloj ordonas al li. Kaj mi kompatas vin.

Ĵilin diras:

— Se vi kompatas min, alportu al mi longan bastonon.

Ŝi balancas kapon, ke „estas ne eble“. Li kunmetis manojn, petegas ŝin:

— Dina, mi petas! Dina, alportu!

— Neeble,—ŝi diras,—oni ekvidos, ĉiuj estas hejme,— kaj si foriris.

Jen Ĵilin sidas vespere kaj pensas: „kio estas?“ Li ĉiam ekrigardas supren. Steloj estas vidataj; kaj luno ankoraŭ ne leviĝis. Tatara pastro kriis jam, ĉio silentiĝis. Ĵilin jam komencis dormeti, pensas: „la knabino timos“.

Subite argilo eksutiĝis al li sur la kapon; li ekrigardis supren,—longa stango puŝiĝas je tiu rando de la kavo. Ĝi puŝiĝis iom, komencis supreniĝi en la kavon. Ĵilin ekĝojis, ekkaptis ĝin per la mano, malsuprenigis; la stango estas fortika. Li vidis tiun ĉi stangon antaŭe sur tegmento de la mastra domo.

Li ekrigardis supren,—steloj alte brilas sur ĉielo; kaj super la kavo mem la okuloj lumas en mallumo ĉe Dina, kvazaŭ ĉe katino. Ŝi kliniĝis per vizaĝo sur la randon de la kavo kaj murmuretas: „Ivano, Ivano!“ Kaj ŝi mem ĉiam ŝvingas per la manoj apud la vizaĝo, ke — „pli mallaŭte“.

— Kion? Ĵilin diras.

— Ĉiuj forveturis, nur du restis hejme.

Ĵilin diras.

— Nu, Kostilin, ekiru, provu lastan fojon: mi helpos al vi elrampi.

Kostilin eĉ ne volas aŭskulti.

— Ne, li diras, videble, mi ne eliros de tie ĉi. Kien mi iros, se mi ne havas fortojn eĉ por min turni.

— Nu, tiaokaze adiaŭ, ne rememoru malbone. Kaj li interkisiĝis kun Kostilin.

Li ekkaptis la stangon, ordonis al Dina teni, ekrampis. Dufoje li falis,—la ŝtupo malhelpis. Kostilin subtenis lin, kaj li iel eliĝis supren. Dina tiras lin per la manetoj je la ĉemizo per ĉiuj fortoj, mem ridas.

Ĵilin prenis la stangon kaj diras:

— Forportu reen, Dina, alie oni rimarkos, batos vin.

Ŝi ektiris la stangon, kaj Ĵilin ekiris malsupren de monto. Li malsupreniĝis iom, prenis akran ŝtonon, komencis forbati de la ŝtupo la seruron. Kaj la seruro estas fortika—li neniel povas forbati. Li aŭdas, iu kuras malsupren de monto, facile saltetas. Li pensas: „certe, denove Dina“. Dina alkuris, prenis ŝtonon kaj diras:

— Lasu, mi faros.

Ŝi sidiĝis genuflekse, komencis forbati. Sed maldikaj manetoj, kvazaŭ vergetoj, havas nenian forton. Ŝi ĵetis ŝtonon, ekploris. Ĵilin denove komencis forbati seruron, kaj Dina ekkaŭris apud li, tenas lin je la ŝultro. Ĵilin ekrigardis ĉielon, vidas—maldekste, post monto, ĉielruĝo montriĝis, luno komencas leviĝi. „Nu, li pensas, mi devas trairi valeton, atingi arĉaron antaŭ ol la luno leviĝos“. Li sin levis, ĵetis la ŝtonon. Kvankam en ŝtupo, li devas iri.

— Adiaŭ, Dinjo! li diras. Mi ĉiam memoros vin.

Dina ekkaptis lin; traserĉas lin per manoj, kien enŝovi al li pastelajn. Li prenis pastelajn.

— Dankon, karulino! li diras. Kiu faros al vi pupojn sen mi?

Kaj li karesis sian kapon.

Dina ekploris, fermis vizaĝon per manoj, ekkuris surmonten, kvazaŭ kaprineto saltas. Nur aŭdiĝas en mal-lumo,—la ĉirkaŭkolo tintas je dorso.

Ĵilin faris krucan signon, prenis la ŝtipan seruron en la manon, por ke ĝi ne tintu, ekiris sur la vojo,—li trenas piedon kaj mem ĉiam ekrigardas ĉielruĝon, kie luno leviĝas. Li ekkonis la vojon. Estas ok verstoj por iri rekte. Nu se li atingus arbaron antaŭ ol la luno tute leviĝos. Li transiris rivereton,—lumo post monto jam blankiĝis. Li ekiris laŭ valetto, iras kaj mem ekrigardas: ĉu la luno jam leviĝis. Jam ĉielruĝo heliĝis kaj de unu flanko de la valetto fariĝas ĉiam pli hele. Ombro rampas malsupren de monto, ĉiam proksimiĝas al li.

Ĵilin iras, ĉiam tenas sin en ombro. Li rapidas, kaj luno leviĝas ankoraŭ pli rapide; jam ankaŭ dekstre suproj eklumiĝis. Li komencis aliri al arbaro, la luno eliris el post montoj,—estas blanke, tute hele, kiel tage. Ĉiuj folietoj estas vidataj sur arboj. Mallaŭte estas sur montoj, kvazaŭ ĉio elmortis. Nur estas aŭdate—rivereto bruetas malsupre.

Li atingis arbaron,—neniuj renkontiĝis. Ĵilin elektis en arbaro lokon pli malluman. Sidiĝis por ripozi.

Li ripozis, manĝis pastelon. Li trovis ŝtonon, komencis denove forbati seruron. Li elvundis tutajn manojn, sed ne forbatis. Li sin levis, ekiris laŭ la vojo. Li pasis unu verston, perdis fortojn,—la piedoj doloras. Li pasas

dek paŝojn kaj haltas. „Kion fari, li pensas: mi trenos min, dum fortoj restas. Si mi sidiĝos, mi tiam ne levos min. Mi ne ĝisiros ĝis fortikaĵo, sed kiam tagiĝos, mi kuŝiĝos en la arbaro, pasigos tagon, kaj nokte mi ekiros denove.

Li iris tutan nokton. Nur du tataroj rajde renkontiĝis, — sed Ĵilin ekaŭdis ilin de malproksime, sin kaŝis post arbo.

La luno jam komencis paliĝi, ekrosis, baldaŭ tute tagiĝos, kaj Ĵilin ankoraŭ ne atingis randon de la arbaro. — „Nu“, li pensas, „mi pasos ankoraŭ tridek paŝojn, flankeniĝos en arbaron kaj sidiĝos“. Li pasis tridek paŝojn, vidas—la arbaro finiĝas. Li eliris sur la randon—estas tute hele, stepo kaj fortikaĵo estas antaŭ li kiel sur manplato, kaj maldekste, tute proksime malsupre de monto fajroj brulas, estingiĝas, fumo sterniĝas, kaj homoj estas apud lignofajroj.

Li enrigardis, vidas, — la pafiloj brilas, kazakoj, soldatoj.

Ĵilin ekĝojis, kolektis lastajn fortojn, ekiris malsupren de monto. Kaj mem li pensas: „Dio gardu, se rajda tataro ekvidos tie ĉi en kampo, mi ne foriros, kvankam estas proksime“.

Apenaŭ li pensis—jen: maldekste, sur monteto, staras tri tataroj. Ili ekvidis lin, ekkuris al li. La koro tute falis ĉe li. Li eksvingis manojn, ekkriis, kiom da fortoj li havis:

— Fratoj! helpu! fratoj!

— Niaj ekaŭdis, rajdaj kazakoj elveturis. Ili ekgalopis al li.

Al kazakoj estas malproksime, al tataroj estas proksime. Sed Ĵilin kolektis ĉiujn lastajn fortojn, ekprenis ŝtipon per la mano, kuras al la kazakoj, sin mem ne memoras, faras krucajn signojn kaj krias:

— Fratoj! fratoj! fratoj!

Estis dekkvin kazakoj.

Tataroj ektimis kaj ne ĝisveturinte komencis halti. Ĵilin alkuris al la kazakoj.

La kazakoj ĉirkaŭis lin, demandas: „kiu li estas, de kie?“ Ĵilin sin mem ne memoras, ploras, alparolas:

— Fratoj! fratoj!

Soldatoj elkuris, ĉirkaŭis Ĵilin'on; iu donas al li pannon, iu — kaĉon, iu — brandon, iu kovras per mantelo, iu disbatas la ŝtipon.

Oficioj ekkonis lin, ekveturigis fortikaĵon. Soldatoj ekĝojis, kamaradoj kunvenis al Ĵilin.

Ĵilin rakontis, kiel ĉio okazis al li, kaj diras.

— Nu jen mi vizitis hejmon, edziĝis! Nu, videble, ne estas sorto al mi fari ĉi tion.

Kaj li restis servi en Kaŭkazo. Kaj oni elaĉetis Kostilin'on ankoraŭ nur post unu monato por kvin mil rubloj. Oni alveturigis lin preskaŭ malvivan.





851



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

112-121 I